

**INFORMILO DE KKE — KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ**

Cooperativa Cultural dos Esperantistas Ltda. — Av. Treze de Maio, 47, sobreloja 208 — Centro  
Rio de Janeiro - RJ — CEP: 20031-921 (21) 2544-4314 Fax: (21) 2220-7486  
retpoŝta adreso: [esperanto.kke@gmail.com](mailto:esperanto.kke@gmail.com) ttt-paĝo: [www.kke.org.br](http://www.kke.org.br)

**Nº 58****9ª JARO (NOVA FAZO)****SEPTEMBRO-OKTOBRO/2010****ĈI-NUMERE: PRELEGO DE FLORIANO PESSOA****Juveloj de la Esperanta Traduk-arto**

## Eventos

**Jul, 2** – Palestra em português de Cleber Lemos sobre o tema “Esperantido”, com a presença de 9 pessoas.

**Jul, 5** – Roda Literária / Prosa em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

**Jul, 9** – Palestra de Elmir dos Santos Lima sobre o tema “Esperanton Dormi Helpas”, com a presença de 13 pessoas.

**Jul, 12** – Roda Literária / Poesia em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

**Jul, 19** – Roda Literária / Literatura brasileira em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

**Jul, 23** – Palestra de Alexandre Emanuel Ramos Costa sobre o tema “Introdução à Neuro-linguística”, com a presença de 12 pessoas.

**Jul, 26** – Roda Literária / O estilo de Zamenhof / Coordenação de Aloísio Sartorato.

**Jul 30** - *Festa dos Aniversariantes do mês de Julho*, com a presença de 12 pessoas.

**Ago, 2** - Roda Literária / Coordenação de Jair Salles.

**Ago, 4** - Clube de Conversação / Bate-papo com Aloísio Sartorato.

**Ago, 6** – Palestra de Alfredo Aragón sobre o tema “Fulma

Vojaĝo al Aŭdvida Muziko”, com a presença de 15 pessoas.

**Ago, 9** – Roda Literária / Coordenação de Jair Salles.

**Ago, 11** – Clube de Conversação / Bate-papo com Aloísio Sartorato.

**Ago, 13** - Palestra de Luiz Carlos Taveira sobre o tema “Astrologia: Uma Abordagem Cármica”, com a presença de 14 pessoas.

**Ago, 16** – Roda Literária / Coordenação de Jair Salles.

**Ago, 18** – Clube de Conversação / Bate-papo com Aloísio Sartorato.

**Ago, 20** – Palestra de Robson Mattos sobre o tema “Miaj Personaj Impresoj pri la 95ª UK en Havano”, com a presença de 15 pessoas.

**Ago, 21** – Passeio ao Jardim Botânico do RJ, ciceroneado por Laura Pereira de Alcântara.

**Ago, 23** – Roda Literária, coordenada por Jair Salles.

**Ago, 25** – Clube de Conversação / Bate-papo com Aloísio Sartorato.

**Ago, 27** – *Festa dos Aniversariantes do mês de agosto*, com a participação especial de *Genésio Nogueira* (violão) e a presença de 12 pessoas.

**Ago, 30** – Roda Literária, sob a coordenação de Jair Salles.

## Doações para a Caixa Geral

João Gomes Soares: R\$ 10,00; Álvaro Motta: R\$ 150,00; Romeu Matushika: R\$ 91,00; Anônimo: R\$ 110,00; Guilherme Fians: R\$ 10,00; Givanildo Ramos Costa: R\$ 10,00. *Koran dankon al ĉiuj!!!*

## Campanha “Esperanto nas Bibliotecas”

Célio Brandão: R\$ 80,00. *Dankegon!*

## Doações da Campanha Esperanto nas Bibliotecas

94. Biblioteca do Colégio Francisco de Assis (Rio de Janeiro, RJ); 95. Biblioteca Nair Lacerda (Santo André, SP); 96. Biblioteca do Projeto Comunitário Verda Koreto (Rio de Janeiro, RJ)

## Expediente

**InKo**, boletim informativo da Cooperativa Cultural dos Esperantistas; edição nº 58, setembro-outubro 2010.

**Coordenação:** Givanildo R. Costa, Presidente da KKE.

**Redação:** Aloísio Sartorato

**Revisão:** Célio F. Martins

## NI BEZONAS TUJ REAGI ESPERANTLINGVE, IDEALISME

Ekde kiam mi legis la tekston de la prelego farita de la japana profesoro Tsuda Yukio okaze de la Solena Inaŭguro de la 92-a Universala Kongreso de Esperanto, en Jokohamo, Japanio, multe impresis min la trafajn kaj la realsencajn vortojn starigitajn de li pri la pova kapablinfluo de homgrupoj super aliaj, en tiu kazo pere de komunika interrilato de lingvo.

Tutcerte, mi tuj menskonsekvence promenis tra la mondo kaj imagpovis pri kiom da antaŭjuĝaj baroj, kiuj ekzistas inter la mondaj komunumoj, terure, malbonigante la homan kunvivadon.

Ĉi tiu gravega atentigo de tiu profesoro estas por ni ĉiuj serioza starigo, konsiderante ke granda parto el la suferoj surtere estas kaŭzataj de la homo mem. Eble kelkaj diros, ke problemojn oni ĉiam havis, do kial tiu nuna maltrankvileco rilate al tio; aliuloj, certe, komentos, ke historie nia vivprogreso stariĝis tiamaniere, ĉu bone ĉu malbone. Sed por tiuj, kiuj tre atente provas la vivokazaĵojn, jam konkludis, ke ne ĉio, kio okazas en la homa interrilatigo, estas vivnormalaĵo, kaj ke multaj kontraŭstaraj situacioj inter la homoj estas frukto de egoisma sinteno, kiu estas la plej terura malsano el ĉiuj, laŭ mia opinio, eĉ multe pli danĝera ol aidoso, deprimo aŭ iuj ajn aliaj homaj malbonigaĵoj.

Egoismo, kiu ankoraŭ estas taksata de la personoj kiel nur morala religia manifestiĝo, portante nin al iu sensenca infero, ne konsiderante ĝiajn teruregajn konsekvencojn. Pro ĝia uzo, ni, homoj, perdiĝas, kiel ekzemple starigante persekutojn al personoj kaj al popoloj, firmigante krimojn faritajn de homgrupoj kontraŭ aliuloj pro ne interkonsento pri politika sistemo kaj religia pensmaniero, oficialigante, mondscale, tre altan monan komercan imposton, pliriĉigante landojn kaj mizerigante popolojn, kiuj jam estas almozaj, ĉiopovigante landojn, kiuj pro influhavo igas siajn lingvojn mondaj dommastraj komunikiloj, malgraŭ la ekzisto de la helpa internacia lingvo Esperanto.

Esence, la prelego de Profesoro Tsuda pritaktas la nerespekton de la okcidenta civitana procedo rilate al la orienta en la mondo, surbaze de supervalorigo de la angla. Estas de li ĉi-tiu pensiga frazo, kiu tre serioze, meditigas nin: "... La ekzisto de Esperanto jam profunde pridemandas la regadon de la angla. En mia hodiaŭa parolo mi intencis konsciigi, ke *Okcidento en Oriento* fakte signifas *Okcidento super Oriento*. Nia defio estas egaligi rilaton inter Oriento kaj Okcidento. Pro tio, simpla akcepto ne sufiĉas."

Do, mi, kiel multaj anoj de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, pensas kiel li, ĉar ni celas tutmondan egaligon.

Ni tre dankas al Profesoro Tsuda Yukio pro liaj kuraĝaj vortoj inspiritaj de prelegoj faritaj, diversloke en Usono, kie li atestis la tendencon hegemoniigi la anglan, kiel internacian lingvon.

Ni bezonas urĝe ŝanĝi nian kunvivmanieron, se ni volas nian mondon feliĉa.

Forigu ni tuj la egoismon dum ni havas tempon, pere de la idealisma esperanta sinteno.

**Givanildo Ramos Costa**

# JUVELOJ DE LA ESPERANTA TRADUK-ARTO

Floriano Pessoa

1. Bone traduki beletran aŭ teknikan tekston en Esperanton: jen la deziro, la revo de multaj esperantistoj. Kial ne efektiviĝi ĝin? Dank'al la kelkdek libroj kaj artikoloj pri tiu temo, fariĝis konataj la ĉefaj trajtoj de la traduka laboro: ĝi estas: malfacila arto-tekniko, tre grava por la plua disvolviĝo kaj diskonigo de Esperanto; ĝi postulas regadon, de la fonto- kaj de la celo-lingvo, klercon, kreivon kaj feran disciplinon. Iuj libroj eĉ donas liston de praktikaj konsiloj al kandidatoj kaj novicoj sur tiu kampo.

Ni esperantistoj disponas lingvon tre riĉan, kapablan perfekte esprimi, ĉian nuancon de la penso.

Plie, la brazila kaj la tutmonda literaturo svarmas per belaj kaj utilaj verkoj, kiuj invitas kaj defias nin al tradukado. Efektive, kelkaj homoj estas allogataj kaj entreprenas tian laboron, sed, pro nesufiĉa preparado, rezignas ĝin. Feliĉe, troviĝas en Brazilo, kaj eksterlande, bonegaj tradukistoj, el pluraj lingvoj al Esperanto.

Kiuj estas la sekretoj de tiuj lingvo-artistoj? Ĉu ne eblas iom spioni ilian verkaron kaj konatiĝi kun iliaj teknikoj metodoj, kutimoj, preferoj, manioj? Mi respondas jese. Kaj por montri al aliaj tiun eblecon, mi elektis kelkajn tekstojn en la originalaj lingvoj, ilin komparis kun la respondaj versioj en Esperanto, kaj faris komentojn.

Per tio mi esperas iom ebenigi la vojon al aliaj esperantistoj dezirantaj sperti la ĉarmojn de la Traduk-arto.

## 2.Originala teksto.

Foi sempre com sobressalto e exaltação patriótica que, na minha mocidade, eu via o Imperador.

### Traduko

**Ĉiam forte emociite, kaj kun patriota ekzaltiteco, mi en mia juneco vidadis la Imperiestron. (1).**

*Komento: La unua zorgo de tradukanto devas esti la funda kompreno de la originalo. Dank'al tia kompreno, li ĉi tie trovis simplan kaj elegantan solvon por "com sobressalto".*

3. Ver o Imperador era, aliás, ver passar a galope o cortejo imperial.

**Vidi la Imperiestron estis ĜUSTADIRE vidi pretergalopi la imperiestran irantaron. (1)**

*La uso de ĜUSTADIRE (kaj ne de iu rutina CETERE) por traduki ALIÁS, ankoraŭfoje atestas, ke la tradukanto plene komprenas la tekston kaj vikle atentis ĝin.*

4. A luz vinha devagar, do nascente, e rastejava pelas montanhas, talvez porque não conseguisse vencer a grande massa branca, impalpável e espessa, que tudo tornava indeciso e vago, diluído em meias-tintas, em reflexos de opala.

**La lumo venis malrapide, el la leviĝejo de la suno, kaj rampadis sur la montoj eble tial, ke ĝi ne sukcesis venki la grandan blankan nepalpeblan kaj densan mason, kiu faris ĉion neklara kaj malpreciza, disperdiĝinta en nuancojn, en opalecajn rebrilojn. (1)**

*Multon ni povas lerni per la analizo de tiu ĉi teksto. Unue, ke eblas bonege priskribi pejzaĝon aŭ rakonti okazaĵon uzante simplan lingvaĵon, nome la klasikan fundamentan Esperanton. Plie, ni rimarkas, ke, same kiel Zamenhof, la tradukinto preferas analizajn formojn ol kunmetaĵojn (leviĝejo de la suno, anstataŭ sunleviĝejo); li sisteme uzas la sufikson AD (rampadis), por emfazi, ke temas pri daŭra aŭ ripetiganta ago; eble pro belsoneco, li uzis TIAL, KE anstataŭ ĈAR, kaj tiel evitis la iom krudan grupon ĈAR ĜI. Ĉiam fidela al la Zamenhofa tradicio, li skribas FARIS ĈION NEKLARA, kaj ne IGIS ĈION NEKLARA. Ĉi tiun formon li forte malkonsilis en lia fama artikolo “IGI kaj IĜI, en la revuo “Brazila Esperantisto”. La vorton ESPESSA li tradukas per DENSA, kaj ne per DIKA, ĉar oni parolas pri NEBULO. INDECISO, ĉi tie estas NEKLARA, tute ne sendecida. La lasta esprimo (DISPERDIĜINTA EN NUANCOJN, EN OPALECAJN REBRILojN estas majstra solvo de ŝajne senelira traduko-problemo. Pliaj komentoj superfluas.*

5. No largo irregular, em frente à velha igreja do Rosário, não se conseguia ver de um lado para outro.

**Sur la neregulforma placo, kontraŭ la malnova preĝejo de la Rozario, oni ne sukcesis vidi la transan flankon. (1).**

*Neregulforma, ne nur neregula, ĉar temas pri la formo de la placo.*

*Rimarku la uzon de KONTRAŬ kun ĝia klasika signifo “frente al”.*

*Ver de um lado para outro = vidi la transan flankon. Ĉu ne simpla kaj trafa?*

6. De súbito, os sinos repicaram argentinos.

**Subite la sonoriloj arĝente eksonoris. (1).**

*La tradukinto memorigas nin, ke la vorto argentino já devenas de arĝento (latine argentum)*

7. ... um convite à luz, às horas iluminadas do dia que tardava a romper.

**... invito al la lumo, al la lumaj horoj de la tago, kies matenruĝo jam malfruiĝis (1).**

*Ĉi tie mi povas nur admiri kaj aplaŭdi la belan tradukon de “que tardava a romper”.*

8. A ratos el patrón emboca un caracol y le arranca un sonido bronco y quejumbroso que va a morir en el fondo de las mudas soledades circundantes y entonces se alza dentro del monte ribereño la desapacible algarabía de las chenchenas o se escucha, trás los recodos, el rumor de las precipitadas zambullidas de los caïmanes que dormitan al sol de las desiertas playas, dueños terribles del ancho, mudo y solitário rio.

**De tempo al tempo la bongestro premas al sia buŝo maran konkon kaj elblovas el ĝi plendan raŭkan sonon, kiu reeĥas ĝis la fundo de la ĉirkaŭanta muta soleco. Tiam, en la ĉe-rivera densejo leviĝas la grinca kriado de la “chenchenas”, aŭ aŭdiĝas trans la bordo-sinuoĵ la rumoro**

**de haste plonĝantaj kajmanoj, teruraj majstroj de la larĝa, muta kaj soleca rivero, kiuj dormetas sub la suno de la dezertaj strandoj. (2).**

*En ĉi tiu bela traduko de la Venezuela romano “Doña Barbara”, Fernando de Diego utiligas du ofte uzatajn rimedojn en tradukado. Unue, li dividas longan periodon en du pli mallongajn (la dua komenciĝas per TIAM). Poste, li ŝanĝas la ordon de la vortoj en la lasta periodo (aŭ aŭdiĝas ..). Per tio la teksto fariĝas ankoraŭ pli klara kaj belsona.*

9. Eram os retirantes, nada mais. Meninotas, com as pregas da súbita velhice, careteavam, torcendo as carinhas decrépitas de *ex-voto*. Os vaqueiros másculos, como titãs alquebrados, em petição de miséria. Pequenos fazendeiros, no arremesso igualitário, baralhavam-se nesse anônimo aniquilamento. Mais mortos do que vivos. Vivos, vivíssimos, só no olhar. Pupilas do sol da seca. Uns olhos espasmódicos de pânico, como se estivessem assombrados de si próprios. Agônica concentração de vitalidade faiscante.

**Ili estis la elirantoj, nenio pli. Mezkreskaj knabinoj jam kun la sulkoj de la subita maljuneco, grimacis per kuntiriĝo de la malgrandaj kadukaj vangoj de promesoferita sankta bildo. La virecaj bovisto, kiel disbatitaj titanoj, en fundo de mizero. Negravaj bienuloj, ĉe la egaliga forpuŝo, miksiĝis en tiu sennoma neniigo. Pli mortaj, ol vivaj. Vivaj, vivegaj, nur per la rigardo. Pupiloj el suno de sekeco. Spasmaj okuloj en paniko, mirigitaj de si mem. Agonia koncentriĝo de elradia vigleco. (3).**

*Hazarde en ĉi tiu specimeno ne aperas regionaj terminoj. Sed por traduki “A Bagaceira” (La Bagasejo), de José Américo de Almeida, Geraldo Mattos devis vaste uzi sian stokon de nordorientaĵoj. Krome, li metis glosaron en la fino de la libro.*

10. Findo o almoço podiam ser 9 horas Dagoberto Marcão correu à janela...

**Post la matenmanĝo, maksimume je la 9<sup>a</sup> horo, Dagoberto Marcalo rapide alpaŝis al la fenestro (3)...**

*Malpli atenta tradukanto eble skribus: Post la tagmanĝo, verŝajne je la naŭa;/... Dagoberto kuris al la fenestro. Sed la klera tradukinto de “A Bagaceira” bone konas la medion, la kulturon kaj kutimojn de la brazila nordoriento kaj tial li povas pli ĝuste interpreti la originalon.*

11 Por kontentige traduki poemon, oni devas esti mem poeto. Vidu kiel nia karmemora Sylla Chaves redonas en Esperanto la faman soneton “As pombas”, de Raimundo Correia. (4).

## AS POMBAS

RAIMUNDO CORREIA

Vai-se a primeira pomba despertada...  
Vai-se outra... vai mais outra... enfim, dezenas  
De pombas vão-se dos pombais, apenas  
Raia, sanguínea e fresca, a madrugada...

E à tarde, quando a rígida nortada  
Sopra, aos pombais, de nóvo, elas, serenas,  
Ruflando as asas, sacudindo as penas,  
Voltam tôdas em bando e em revoada...

Também dos corações, onde abotoam,  
Os sonhos, um por um, céleres voam,  
Como voam as pombas dos pombais.

No azul da adolescência as asas soltam;  
Fogem... mas aos pombais as pombas voltam,  
E eles aos corações não voltam mais.

## LA KOLOMBOJ

RAIMUNDO CORREIA

Vekita, flugas la kolomb' unua...  
Alia... plia... fine cent aŭ mil!  
La kolombejon lasas, post ekbril'  
De freŝa frumateno ruĝe blua...

Vespere, kiam norda vento skua  
Ekblovos, ili venas kun trankvil';  
Denove sonas frapoj de flugil'  
De l' revenanta bando gaje brua.

Simile en la koroj ekburĝonas  
La revoj, kaj flugila bato sonas,  
Samkiel de kolomboj. Tra la blu'

De la junaĝo flugon entreprenas;  
Fuĝas... sed hejmen la kolomb' revenas,  
Kaj rev' al koro ne revenas plu.

12. Kaj admiru la majstran tradukon de la kortuŝa poemo "A cruz da estrada, de Castro Alves, fare de Leopoldo Knoedt. (5).

### A CRUZ DA ESTRADA

*Invidet qui quiescunt.*  
LUTHERO (Worms)

Tu que passas, descobre-te! Ali dorme  
O forte que morreu.  
A. HERCULANO (Trad.)

CAMINHEIRO que passas pela estrada,  
Seguindo pelo rumo do sertão,  
Quando vires a cruz abandonada,  
Deixa-a em paz dormir na solidão.

Que vale o ramo do alecrim cheiroso  
Que lhe afiras nos braços ao passar?  
Vais espantar o bando buliçoso  
Das borboletas, que lá vão pousar.

É de um escravo humilde sepultura,  
Foi-lhe a vida o velar de insônia atroz.  
Deixa-o dormir no leito de verdura,  
Que o Senhor dentre as selvas lhe compôs.

Não precisa de ti. O gaturamo  
Geme, por ele, à tarde, no sertão.  
E a juriti, do taquaral no ramo,  
Povoa, soluçando, a solidão.

Dentre os braços da cruz, a parasita,  
Num abraço de flores, se prende.  
Chora orvalhos a grama, que palpita;  
Lhe acende o vaga-lume o facho seu.

Quando, à noite, o silêncio habita as matas,  
A sepultura fala a sós com Deus.  
Prende-se a voz na boca das cascatas,  
E as asas de ouro aos astros lá nos céus.

Caminheiro! do escravo desgraçado  
O sono agora mesmo começou!  
Não lhe toques no leito de noivado,  
Há pouco a liberdade o desposou.

Vi, kiu celas al la internlando,  
se iam vin haltigos la scivolo  
pri forlasita kruco ĉe vojrande,  
ĝin lasu pace dormi en izoló.

La bonodora rosmarenbranceto  
jetita dank' al via sento pia,  
nur kaŭzos la rompiĝon de kvieto  
de ripozanta aro papilia.

Ĝi estas de obskura sklavo tombo;  
ĉar lin la vivo taŭzis senkompaté,  
lin lasu dormi sub la herba ombro,  
de Dio prizorgita delikate.

Lí ne bezonas vin. Tanagrokanto  
vespere estas lia rekviemo.  
Palumbo sur la branĉ' de kampa planto  
plenigas izolejon per plorĝemo.

La parazito de la kruco brakoju  
per flora ŝirkaŭprenó strece loce,  
Sur herbe la rugetoj foramas flakoj;  
por li lampira loceon ekfajrigas.

Dumnokte, kiam la arbar' senbruas,  
sekretojn diras tomb' al Dia Mastro...  
Al buŝo de kaskado voĉon gluas,  
flugilojn orajn al ĉieloastro.

Pasanto! por la sklavo-kondamnito  
trankvila dormo ĝuste nun alvenis!  
Ne rompu pacon de la nuptolito,  
libero ĵus lin kiel edzon prenis.

Recife, 22 de junho de 1865.

U - informilo de KKE —septembro-oktobro/2010 7

13. Kaj por fini, per ora ŝlosilo, ĉi tiun babiladon, jen la traduko, kiun faris Kalocsay, el la franca originalo, de la poemo *Éxtase*, de la genia Victor Hugo (6).

## EXTASE

Et j'entendis une grande voix.  
*Apocalypse.*

J'étais seul près des flots, par une nuit d'étoiles.  
Pas un nuage aux cieus, sur les mers pas de voiles.  
Mes yeux plongeaient plus loin que le monde récl.  
Et les bois, et les monts, et toute la nature,  
Semblaient interroger dans un confus murmure  
Les flots des mers, les feux du ciel.

Et les étoiles d'or, légions infinies,  
A voix haute, à voix basse, avec mille harmonies,  
Disaient, en inclinant leurs couronnes de feu;  
Et les flots bleus, que rien ne gouverne et n'arrête,  
Disaient en recourbant l'écume de leur crête :  
— C'est le seigneur, le seigneur Dieu!

Novembre 1828.

## EKSTAZO

Mi staris ĉe la maro en nokto riĉe stela,  
sennuba la ĉielo, la mar' estis senvela,  
trans la realan mondon perdiĝis la rigard'.  
Kaj montoj kaj arbaroj kaj ĉio tra l' Naturo  
jen, ŝajnis nun konfuze demandi per murmuro  
al mara ond', al astra ard'.

Kaj ĉiu ora stelo, sennombraj stellegioj,  
altvoĉe kaj basvoĉe kaj per mil harmonioj  
respondis ekklinante la kronojn el radi'.  
La bluaj ondoj, kiujn ne regas, bridas estro,  
respondis dum ekklino de sia ŝaŭmo-kresto:  
jen la Sinjor', Sinjoro Di'!

### CITAĴOJ:

- (1) *Porto Carreiro Neto* (originaloj de Rodrigo Otávio, kaj Cornélio Pena, *Brazila Esperantisto*, 1963/66).
- (2) *Fernando de Diego* (originalo de Rômulo Gallegos), *Venezuela Esperanto-Asocio*, 1975.
- (3) *Geraldo Mattos*, (originalo de José Américo, "La Bagasejo"), *Fonto*, 1985.
- (4) *Sylla Chaves*, (originalo de Raimundo Correia), *Por pli bona mondo*, FGV, 1970.
- (5) *Leopoldo Knoedt*, (originalo de Castro Alves), *Elektitaj poemoj*, Ministerio de Edukado kaj Kulturo, 1959.
- (6) *Kalocsay, K* (originalo de Victor Hugo), *Tutmonda sonoro*, vol. 2, *Hungara Esperanto-Asocio*, 1981.





## La arto aŭskulti

Rubem Alves

Mi ĉiam vidas anoncojn pri parolarto. Sed mi neniam vidis anoncojn pri aŭskultarto. Ĉiuj volas lerni paroli, neniuj volas lerni aŭskulti. Mi eĉ pensis proponi kurson pri aŭskultarto, sed mi pensas, ke neniuj interesiĝos pri ĝi.

Aŭskulti estas subtile kaj komplike. Alberto Caeiro diras, ke "ne sufiĉas ne esti blinda por vidi la arbojn kaj la florojn. Estas ankaŭ necese ne havi iun ajn filozofion."

Filozofio estas aro da ideoj, ene de iu kapo, pri kio estas la mondo. Por vidi, estas necese, ke la kapo estu tute malplena.

Denove Alberto Caeiro: "Ne sufiĉas havi orelojn por aŭdi, kion oni diras; estas ankaŭ necese, ke ekzistu kompleta silento ene de la animo.

Pro tio la malfacileco: neniuj estas sufiĉe pacienca por aŭdi, kion la alia diras, sen interrompi, ne miksante, kion li diras kun tio, kion oni volas diri. Kvazaŭ tio, kion li diras ne gravas kaj bezonus esti kompletigata per tio, kion oni diros, kiu kompreneble estas multe pli grava.

Nia nekapablo aŭskulti estas la elmontro pli konstanta kaj subtila de nia aronganteco kaj vanteco: verdire, ni estas la plej belaj...

Mi havas malnovan amikon, Jovelino, kiu transloĝiĝis al Usono en 1964. Li rakontis al mi pri sia sperto kun indianoj: kunsidante, neniuj parolas. Estas nur longa, longa silento. (La pianistoj, antaŭ ol komenci la koncerton, restas ankaŭ sidantaj silente, [...] malfermante malplenojn da silento, forigante ĉiujn strangajn ideojn). Ĉiuj en silento, atendante la esencan penson. Subite iu parolas. Mallonge. Ĉiuj aŭskultas. Finita la parolo, nova silento. Tuj paroli estos granda malrespekto, ĉar la alia esprimis siajn pensojn, pensojn, kiujn li opinias esencaj. Ili estas strangaj al mi, do estas necese iom da tempo por kompreni, kion la alia diris.

Se mi tuj parolos, estas nur du eblecoj. Unue: "Mi restis silenta nur pro edukiteco. Vere, mi ne aŭdis, kion vi diris. Dum vi parolis, mi estis pensanta pri aferoj, kiujn mi parolos, kiam vi finos vian parton. Mi parolas kvazaŭ vi ne estis parolinta.

Due: "Mi aŭdis, kion vi parolis. Sed tio, kion vi parolis kiel novaĵon, mi jam estis pensinta antaŭlonge. Estas malnova afero por mi. Pro tio mi ne bezonas pensi pri tio, kion vi parolis."

En ambaŭ kazoj, mi juĝas la alian naiva. Kaj tio estas pli malbona ol vangofrapo.

La longa silento signifas: "Mi estas zorge rezonanta pri tio, kion vi parolis" Kaj tiel daŭras la kunveno. Ne sufiĉas la ekstera silento, estas necesa la interna silento. Malesto de pensoj. Kaj tiam, kiam okazas la interna silento, oni ekaŭskultas aferojn, kiuj ne povis esti aŭditaj.

Mi komencis aŭskulti.

Fernando Pessoa estis konscia pri tio, kaj aludis al io, kion oni aŭdas dum la paŭzo inter la vortoj, en la loko kie ne estas vortoj.

La muziko okazas, kiam oni silentas. La animo estas katedralo subakviĝinta. En la fondo de la maro – tiu, kiu subakviĝas bone scias pri tio – la buŝo restas fermita. Ni estas nur okuloj kaj oreloj. Tie, tute liberaj de la bruo de la parolo kaj de filozofiaj scioj, ni aŭdas la melodion, kiu ne ekzistis kaj kiu, plena je beleco, plorigas nin.

Por mi, Dio estas tio: la beleco, kiun ni aŭdas dum la silento. Pro tio, la graveco scii aŭskulti la alian: la beleco ankaŭ loĝas tie.

Kuneco okazas, kiam la beleco de la alia kaj nia beleco kuniĝas en iu kontrapunkto.

Tradukis: Aloísio Sartorato

# Trajno polva ĉirkaŭurba

Solano Trindade (adapte tradukis Sylla Chaves)

Trajno polva ĉirkaŭurba,  
kurante, kurante,  
montradas al ni:  
jen homo malsata!  
jen homo malsata!  
jen homo malsata!  
fiiii!

Unua stacio,  
denove ĝi diras,  
denove ĝi kuras:  
jen homo malsata!  
jen homo malsata!  
jen homo malsata!

La dua stacio,  
la tria, la kvara,  
la kvina, la sesa,  
trajno polva ĉirkaŭurba,  
kurante, kurante,  
montradas al ni:  
jen homo malsata!  
jen homo malsata!  
jen homo malsata!

Malgajaj mienoj,  
vojaĝo sen fin',  
malfruas alvenoj  
al ies destin'.

Trajno polva ĉirkaŭurba,  
kurante, kurante,  
ripetas al ni:  
jen homo malsata!  
jen homo malsata!  
jen homo malsata!

Nur ĉe stacidomoj  
Malrapidiĝante,  
ĝi aldonas ion:  
se homoj malsatas,  
donu da pan'!  
se homoj malsatas,  
donu da pan'!  
se homoj malsatas,  
donu da pan'!

Sed l'aera bremsa,  
ĉiam ordonema,  
silentigas ĝin:  
ŝŝŝŝŝ!

(El "Brazila Esperanta Parnaso")

## SE VOCÊ JÁ FEZ O “CURSO BÁSICO” ... ESTÁ NA HORA DE FAZER O SEU “APERFEIÇOAMENTO”!...

**1 – INTRODUÇÃO** – Se você – ou o seu professor – optar pelo nosso “Método Misto-Dinâmico”, note que o mesmo é constituído por 3 livros, que representam os 3 estágios principais no estudo de uma língua. Como muitos leitores já devem saber, esses 3 livros são os seguintes:

- (1) “MINICURSO DE ESPERANTO” (Curso Introdutivo);
- (2) “ESPERANTO CONVERSACIONAL” (Curso Básico);
- (3) “LA KONVERSACIA KLUBO” (Curso de Aperfeiçoamento).

O 1º livro tem apenas 5 lições bem acessíveis. Mas trata-se de um “Curso Introdutivo” que, embora de modo resumido, apresenta toda a “essência” do Esperanto, ou seja: apresenta todo o sistema da pronúncia; apresenta todos os interrogativos (ou seja: quem, quando, onde, etc.), que constituem, naturalmente, a base da conversação em qualquer língua; e apresenta, também, todas as 6 terminações verbais do Esperanto, como: AS, IS, OS, etc. Logo depois deste “Curso Introdutivo”, o aluno deverá fazer o “Curso Básico”, através do livro “Esperanto Conversacional” (com apenas 10 lições). Finalmente, o aluno realmente interessado deverá fazer o “Curso de Aperfeiçoamento”, com o livro “La Konversacia Klubo”, também com 10 lições – mas contendo, no final, um “Suplemento Gramatical” bastante detalhado, sobre o qual falaremos no próximo e último item deste breve artigo.

**2 – COMO FAZER O INDISPENSÁVEL “APERFEIÇOAMENTO”** – É uma pena que muitos alunos inteligentes parem o seu estudo no nível do “Curso Básico”!... Ora, principalmente no “Suplemento Gramatical” do livro “La konversacia Klubo”, os interessados poderão encontrar explicações (e “macetes”) sobre os 7 pontos mais “delicados” do Esperanto, ou seja: (1) acusativo; (2) correlativos; (3) preposições; (4) participios; (5) pronome “sia”; (6) sufixos “ig/iĝ”; e (7) a aglutinação própria do Esperanto. Todos os livros citados podem ser estudados “com ou sem professor”. Se você ainda não os estudou, peça-os já à nossa Cooperativa ([www.kke.org.br](http://www.kke.org.br)). Experimente!...



Robson Mattos prelegas pri la 95<sup>a</sup> UK



Partoprenantoj de la aŭgusta promenado



Cleber Lemos prelegas pri “Esperantido”



Elmir prelegas pri “Esperanton dormi helpas”



Givanildo gvidas la Feston de la Datrevenantoj de Julio



Argentina samideano Rubén Sánchez salutas la ĉeestantojn